

INTERNACIA

PEDAGOGIA REVUO

IPR

Eldonata de Internacia Ligo
de Esperanto-Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 6

N-ro 2, 1976

Pizo, Italujo

statuto de ilei

Enhavo	Paĝo
*** Statuto de Ilei	25
H. Sonnabend - Pri kunlaboro Uea-Ilei	30
R. Pagliarani - Kio estas la scienco «pedagogio»	32
S. Mariani - Projekto pri instruado	34
W.A. Gething - Gvidado de la junularo	38
F. Le Magature - La vivaj lingvoj (<i>recenzo</i>)	41
Lentaigne - La eraroj ... de la aliaj	43
J. L. Lewine, W.P. Sampson - El nordameriko	45
*** En plua universitato	48
Freinet, trad: Lentaigne - La ĉevalo kiu ne soifas	koverta 3

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

Oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)
Aperas trifoje jare

Redaktis: G. Turin
43, rue E, Magnin
F - 25300 Pontarlier

Konto: Helmut Sonnabend - Sonderkonto
Poŝtĉekkonto n-ro 3245 66-309
Hannover

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI, escepte nemembroj de ILEI povas pagi al la supre indikita konto.

Statuto de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj I.L.E.I. (fondita en la jaro 1949)
Aprobata dum la komitata kunsido 1-8-1969 en Helsinki

Paragrafo 1

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, en plua teksto la Ligo, agnoskita de Unesko la 13an de Oktobro 1952, estas unuigo de:

- landaj esperantistaj instruistaj asocioj;
- individuaj membroj en tiuj landoj en kiuj ankoraŭ ne estas organizata asocio.

Kondiĉoj por membriĝo estas:

- 1) Havi 5 pagintajn membrojn (asocioj);
- 2) Doni subskribitan rekonon de la Statuto de la Ligo;
- 3) Pagi la fiksitajn membrokotizon;
- 4) Ricevi akcepton flanke de la estraro.

Paragrafo 2

La celoj de la Ligo estas:

- unuigi ĉiujn instruistajn Esperanto-organizaĵojn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn;
- eventuale aranĝi superajn ekzamenojn pri la instruado de la Internacia Lingvo;
- organizi pedagogiajn konferencojn, kiuj estu aranĝotaj kaj invitotaj de la unuopaj landaj asocioj;
- organizi reciprokajn interŝanĝojn de spertoj de la monda Esperanto-instruistaro rilate al la plibonigo kaj modernigo de la Esperanto-instruado;
- organizi interŝanĝojn de la plej diversaj spertoj el la pedagogia scienco kaj praktikado;
- daŭre aranĝita plej diversajn aranĝojn internaciajn por la infanoj, por ke ili apliku la Internacian Lingvon;
- eduki la infanojn al internacia interkompreniĝo.

Paragrafo 3

En realigo de siaj celoj kaj progamoj la Ligo kunlaboras kun diversaj esperantistaj kaj ne esperantistaj organizaĵoj.

Paragrafo 4

Stampo de la Ligo estas rondforma kun kvinpinta stelo en la mezo kaj la litero «E» en ĝi, kaj kun plena nomo de la Ligo.

Paragrafo 5

La membriĝintaj sekcioj kaj la individuaj membroj ĉiujare pagas al la Ligo fiksitajn kotizojn.

Individuaj membroj pagas kvinoble la sumon postulata por ĉiu membro de organizita landa sekcio de la Ligo.

Paragrafo 6

La membriĝo en la Ligo ĉesas per:

- a) libervola ekŝigo de la sekcioj;
- b) dujara nepago de la kotizo;
- c) kontraŭstatuta agado.

Paragrafo 7

Organoj de la Ligo estas:

- a) la asembleo;
- b) la komitato;
- c) la estraro;
- ĉ) la kontrolo komisiono.

Paragrafo 8

La asembleo de la Ligo konsistas el la delegitoj de la landaj asocioj de la Ligo elektitaj dum siaj ĉefkunvenoj laŭ jena ŝlosilo:

- ĝis 30 membroj unu delegito;
- ĝis 60 membroj du delegitoj;
- ĝis 90 membroj tri delegitoj, ktp.

Ŝlosila bazo estas la pagita membrotizo por la finiĝinta kalendara jaro.

Delegitoj de landaj sekcioj kiuj ne pagis la kotizon dum du sinsekvaj jaroj, ne rajtas voĉdoni.

La asembleo de la Ligo regule okazu minimume post ĉiu trijara laborperiodo kaj en la kadro, se eble, de la instruista konferenco.

La prezidanto ĝin kunvoku almenaŭ 6 monatojn antaŭ ĝia okazigo.

Paragrafo 9

La asembleo de la Ligo:

- a) pritraktas raportojn de la komitato;
- b) senŝarĝas la komitaton;
- c) decidas pri la gvidlinio da la Ligo kaj fiksas labor-programon por trijara periodo;
- ĉ) akceptas aŭ ŝanĝas la statuton;
- d) fiksas la bilancon kaj budĝeton;
- e) fiksas la membrotizojn;
- f) elektas la estraron.

Paragrafo 10

La komitato de la Ligo konsistas el la prezidantoj de la unuopaj landaj sekcioj aŭ ties anstataŭantoj.

Paragrafo 11

Inter du asembleoj gvidas la Ligon la komitato. La taskoj kaj devoj de la komitato estas:

- a) decidi pri ĝeneralaj aferoj de la Ligo;
- b) pritrakti la laboron de la estraro;
- c) fondi komisionojn de la Ligo;
- ĉ) fiksi laborprogramojn de la unuopaj komisionoj;
- d) decidi pri okazigo de la asembleo kaj aliaj gravaj aranĝoj de la Ligo.

Paragrafo 12

La komitato devas kunsidi almenaŭ unufoje dum la jaro. En kazo de neeblo kunveni okazas referendumo kies decidoj validas same kiel tiuj de la kunsidoj.

Por la ekvalido de la decidoj necesas simpla plimulto de la voĉdonantoj.

Paragrafo 13

La estraro konsistas el la prezidanto, vicprezidanto, sekretario, vicsekretario kaj kasisto.

La oficdaŭro estas jara.

Paragrafo 14

La devoj de la prezidanto estas:

- a) prezidi kunsidojn de la estraro, komitato kaj asembleo;
- b) reprezenti la Ligon en ĉiuj eksteraj aferoj;

- c) certigi persone aŭ per komisiitoj kontakton kaj kunlaboradon kun gravaj instruistaj organizaĵoj kaj institucioj ekster la esperanto-movado;
- ĉ) kunvoki kunsidojn de la estraro kaj komitato.

Paragrafo 15

La devoj de la vicprezidanto estas:

- a) kontakti kun la komitatoj kaj la unuopaj komisionoj, orientigi ilin kaj helpi ilin en ilia laboro;
- b) anstataŭi la prezidanton je lia foresto;
- c) prepari la statistikon pri lernejoj en kiuj oni instruas Esperanton.

Paragrafo 16

La devoj de la sekretario estas:

- a) respondeci pri la organiza stato de la Ligo;
- b) kontakti kun la landaj sekcioj de la Ligo, instigi kaj orientigi ilian laboron;
- c) eltrovi vojojn por instigi fondon de sekcioj en landoj, en kiuj ili ankoraŭ ne ekzistas;
- ĉ) fari la jaran raporton.

Paragrafo 17

La Vicsekretario devas helpi aŭ, se necese, anstataŭi la sekretarion.

Paragrafo 18

La devoj de la kasisto estas:

- a) kontakti kun ĉiuj kasistoj de la landaj sekcioj klopodante ĝustatempe enkollekti membrokotizojn;
- b) esplori eblecojn por solvi financajn problemojn de la Ligo per aliaj rimedoj;
- c) fari raporton pri la financa stato de la Ligo.

Paragrafo 19

La devoj de la landaj sekcioj de la Ligo estas:

- a) fari jaran raporton pri la laboro de la pasinta lerneja jaro: decida tago ĉiam la 1a de Januaro, kaj sendi ĝin al la ĝenerala sekretario antaŭ la fino de Februaro;
- b) fari la necesan statistikon kaj raporti pri tio al la estraro;
- c) fortigi ne nur la propran prestiĝon en sia Lando, sed ankaŭ tiun de la Ligo;
- ĉ) pagi akurate la membrokotizojn sub mencio de la nombro de la anoj de la landa sekcio.

Paragrafo 20

La kontrolo komisiono konsistas el 3 membroj: ĝia tasko estas unufoje en la jaro kontroli la kasostaton kaj finanĉan manipulado de la kasisto. Pri la farita laboro la Kontrolo Komisiono faras raporton al la Komitato de la Ligo kja ĝia asembleo.

kial la redaktoro publikigas nian statuton?

Serioze levigas la demando, kial ILEI malŝparas tiom da valora spaco en IPR por prezenti la enbavon de sia statuto, kvankam ĝi estas sufiĉe konata. Decidita en la jaro 1969 en Helsinki, unuanime akceptita de ĉiuj sekcioj, nun la brita, dana kaj sveda sekcioj deziras ŝanĝojn.

Siatempe en Maribor s—ino Anderson, s—roj Markarian, Dazzini kaj Sonnabend ŝrumpigis ege longan statuton al minimumo de 20 paragrafoj.

ILEI konsistas el preskaŭ 2000 membroj. La kerno de nia statuto estas la asembleo, la plej atakita parto. Sed dumil membroj signifas ĉiam minimume 70-80 delegitojn. Por alproksimiĝi al honesta demokratio la porstatuta komisiono decidis tiucele.

Bedaŭrinde baldaŭ montriĝis, ke nur tre eta parto de delegitoj ĉeestis niajn konferenĉojn. En Budapeŝto dum nia ILEI—konferenco ĉeestis nur kelkaj hungaroj kaj unu bulgaro — kaj la partopreno de niaj socialismaj amikoj nur sumiĝis en preskaŭ nulo.

La ciferoj pasintecce restis magraj. Ne pli ol 20 delegitoj inter 80 ĉeestantoj partoprenis; kaj ILEI havas membrojn en pli ol 35 landoj.

Sub la impreso de neĉeesto de sufiĉe granda nombro en niaj asembleoj, la postulantoj deziras ŝanĝi nian statuton kaj ili ŝajne pravas.

La ĉefa postulo estas modifi la asemblean kaj nur lasi la komitatan sistemon — kiel ekzemple en UEA. Ĉu vere estas la ĝusta vojo, kiam nur relative aktivaj membroj — kompreneble netaj delegitoj — gvidos la sorton de nia Ligo?

Aŭ sendi la kompletan fantoman ciferon de la koncerna sekcio pere de slipoj, kiujn alportas eble nur unu persono? Ĉu vere ILEI kapablos solvi siajn problemojn sen profunda diskutado sen ĉeesto de siaj delegitoj?

La estraro de ILEI sekvas la deziron de la unuopaj sekcioj kaj petas kiel eble plej baldaŭ informi ĝin pri ŝanĝdeziroj. Krom la jam menciitaj deziroj de la tri nomitaj sekcioj ĝis nun ne estas aliaj proponoj. Skribu al la redaktoro de IPR, s—ro G. Turin, pri via opinio.

Helmut Sonnabend,
prezidanto de Ilei

pri kunlaboro uea-ilei

Teksto de la «Interkonsento pri kunlaboro inter Uea kaj Ilei».

1. Ambaŭ organizaĵoj konsentas pri la neceso de intensa kunlaboro inter ili por esence progresigi Esperanton.
Tiucele ili plenumos la jenan agadon:
 - a) Konstantaj interrilatoj
 - interkonsiliĝo en ĉiuj esencaj demandoj koncerne la instruadon de Esperanto;
 - komuna klopodo por atingi Interŝtatan Konvencion por la instruado de Esperanto en la lernejoj;
 - komunaj agadoj ĉe UNESKO.
 - b) Partopreno de ILEI en Universitaj Kongresoj de Esperanto
 - komunaj estrarkunsidoj laŭ bezone;
 - informado pri la laboro de ILEI en la komitatkunsidoj de UEA;
 - ĝenerala publika kunveno pri temo kiu rilatas la instruadon de Esperanto;
 - disponigo de ĝinstruistoj por la Infanaj Kongresetoj laŭbezone.
 - c) Partopreno de UEA en ILEI-konferencoj
 - oficiala reprezentiĝo;
 - kunlaboro en laborgrupoj.
2. La Estraroj de ambaŭ organizaĵoj restos en regula kontakto kaj estos malfermaj al reciproka informado.
3. ILEI ne pagos la kutiman kotizon por asocio kunlaboranta kun UEA, sed pagos realajn administrajn kostojn ĝis la ekvalenta sumo.
4. Tiu ĉi interkonsento ne plu validos se unu el la organizaĵoj ne deziras daŭrigi ĝin. En tiu kazo necesas trimonata averto.

Principa deklaro de la prezidanto de Ilei, rektoro Helmut Sonnabend, post la interkonsento inter Uea kaj Ilei.

Per sia decido en la X-a Konferenco de ILEI en Sanmarino (1976.07.23-29a) la asembleo de ILEI aprobis la interkonsenton pri kunlaboro inter UEA kaj ILEI.

Ĝi ĉefe tekstas, ke ambaŭ organizaĵoj konsentas pri la neceso de kunlaboro inter ili por progresigi Esperanton. Tiucele la du organizaĵoj interkonsilos pri esencaj demandoj koncerne la instruadon de Esperanto, klopodos atingi interŝtatan konvencion rilate la instruadon de Esperanto en la lernejoj, interkontaktos rilate agadojn ĉe UNESKO, instigos aranĝi kaj partopreni infankongresetojn.

Plue per komunaj prezentiĝoj dum kongresoj kaj konferencoj ILEI kaj UEA intencas publike informi kaj akcenti aktualajn temojn.¹⁾

La interkonsento signifas, ke ILEI ne estas iaforme laŭstatuta kunlaboranta fako de UEA. Temas pri interkonsento de du plene sendependaj organizaĵoj.

Post la unikaj eventoj de Hamburgo ĉesiĝis la epoko de Ivo Lapenna-impona personeco kies signifo por la evoluo de Esperanto ĉiam restos netuŝebla. «Liaj esceptaj kvalitoj de diplomato, organizanto kaj oratoro altigis UEA ĝis la rango de rekonata internacia organizo.»²⁾

Abrupte ankaŭ finiĝis la tre intimaj rilatoj inter UEA kaj ILEI kies asociiĝo baziĝis sur la integra forto de Lapenna.

Tiu ĉi nuntempa UEA ne plu estas la sama organizaĵo kiel antaŭ Hamburgo. Ĉiu baza kaj esenca ŝanĝiĝo en iu evoluo ŝanĝos ankaŭ la pensmanieron kaj konceptojn.

La grava ŝanĝiĝo de Hamburgo instrue demonstris al mi, ke ILEI nun kaj estontece nepre devas eviti ĉion, kio povus dronigi ĝin en kirlakvo de eventoj, kies ekiron ĝi ne kaŭzis.

La interkonsento kun UEA estas utila sed ne grava. Mi nur tie klopodos pri kunlaboro, kie mi por ILEI kalkulas utilon. Tial mi opinias, ke la interkonsento pri kunlaboro inter UEA kaj ILEI povos esti tiel longe valida ĝis privilegiĝo la kontraŭo. Tio validas por ĉiuj similaj interkonsentoj kun aliaj organizaĵoj – kaj jam estas kelkaj.

Do, per la interkonsento mi ne intencas levi la prestiĝon de UEA, kaj ankaŭ ne de ILEI. Ni lernis uzi niajn proprajn fortojn! Niaj rilatoj estas nete pragmataj.

Kiam kelkaj sekcioj de ILEI forte maltrankviliĝis, timante, ke la estraro de ILEI entute intencis neglekti la sanktan gralon, ni jam estis detale analizintaj la posthamburgajn eventojn kaj decidis pri novaj vojoj de kunlaboro strikte priatente nian memstarecon kaj suverenecon.

Tute superflue niaj socialismaj sekcioj provis premi nin ĉu ĉantaĝe aŭ ultimate, postulante la senprokrastan revenon al UEA. Ili ne hezitis malhelpi nian vicprezidanton el Hungario viziti niajn estrarkunsidojn aŭ konferencojn kaj eĉ minacis, bloke ekŝiĝi el ILEI.

Nun, post la interkonsento nia vicprezidanto ĉeestis en Sanmarino. Kio vere gravos, estas baldaŭaj konkretaj rezultoj inter ILEI kaj UEA. Spekulacioj pri sukcesplena pacigo de iu estas subniveleaj.

1) Prezentiĝo kompreneble ne povas signifi, ke ILEI ĉiam sekvu la spurojn de kongresaj lokoj de UEA. Prefere la du organizaĵoj decidu pri komunaj lokoj, por ne embarasi membrojn, kiuj deziras partopreni en ambaŭ aranĝoj.

2) D.G. Waringhien

kio estas la scienco «pedagogio»

De prof. Romeo Pagliarani, docento pri filozofio kaj pedagogio en scienca liceo en Ĉezeno, Italujo.

Kio signifas instrui.

Ĉiuj personoj kiuj instruas ion, devas koni almenaŭ la fundamentajn problemojn kiuj rilatas al la instruado, nome pedagogiajn problemojn.

Pedagogio estas kaj scienco, kaj arto: estas scienco, ĉar baziĝas sur sciencaj analizoj faritaj de sociologio, psikologio, antropologio, ekonomio, politiko. Estas arto, ĉar samtempe ĝi baziĝas sur interpersona rilato, kiu estas tute fondita sur la kapablo, de tiu kiu ludas la rolon de instruisto, psikologie intuicii kaj kompreni la individuajn personecon de la lernanto. Se la instruisto ne estas «artista», ne sukcesas eduki iu ajn personon, sed povas nur transdoni iun kvanton da nocioj, kiuj ne starigas la veran kulturon de la persono, tiu estas la kapablon memstare kondukti sin, koni sin mem, kaj trafe interrilati kun la tuto en kiu la persono troviĝas: la socia, homa, politika, religia medio.

Pedagogio, do, baziĝas sur ĝenerala konceptado de la tuta vivo, kaj do fariĝas pedagogia filozofio, ĉar nepre postulas mondkoncepton. Se ni faras nuran «puran» didaktikon, ni tute certe eraras, eĉ pli, ni ne faras ion pedagogie, sed babilas pri teĥnikaj iloj de la metodo, senanime; estus kiel paroli pri la mano sen enkadrigi ĝin sur la fono de la tuta homa korpo!

Kion instruas al ni la moderna pedagogio.

Kiam, en la jaro 1968-a, la studentoj, kontestadante la tutan instruistaron, petis nur novajn programojn, ili celis ja enhavojn, sed antaŭ ĉio novajn metodojn, sume alternativan lernejon.

Sed la studenta kontestado ne estas tute nova afero en la historio de la lernejoj institucioj. Jam *Rousseau*, en la dekoka jarcento, skribis la tre famekonatan verkon «Emilio», en kiu li prezentis alternativan edukmanieron al la tuta mondo. De tiam, pluraj pedagogoj kaj pedagogiistoj, en la tuta mondo konstruis science novajn sistemojn pri la edukado de la homaro, validaj por ĉiuj homoj, ĝenerale. *Dewey*, *Ferrière*, *Claparède*, *Cousinet*, *Freinet*, *Makarenko*, *Montessori*, *Agazzi*, *Piaget*, *Bruner*, jam fariĝis elstaraj en la tuta mondo. Sed, bedaŭrinde, ni devas diri ke en niaj lernejoj ili ne estas sufiĉe konataj fare de la instruistaro, do ili ne estas instruataj al la lernantaro, eĉ pli ne estas sekvataj kiel ili meritus.

Kion ili instruas al ni ĉiuj?

Ili indikas, konkrete kaj alloge, ek de la fino de la pasinta jarcento, kiamaniere ni povas eduki trafe niajn gelernantojn, ĉe iu ajn latitudo de la mondo. La modelo kiun niaj elstaraj pedagogiistoj prezentas al ni, konsistas el tiuj ĉi funda-

mentaj trajtoj: 1. la lernado estas nepre akirebla pere de rekta esplorado; 2. la infano estas antaŭ ĉio senspereceptado, faremo, kaj nur je la dekunu-dekdu jaroj de lia vivo, li kapablas abstrakti, ĉiam elstartante el konkreta situacio, kompreneble: tio estas, kapablas koncepti logike ion preter la materia, sensa mondo; 3. la lernanto devas ĉiam elstarti el tute konkreta situacio, de li mem spertita; li bezonas reprezenti al si mem tiun situacion, pere de desegnaĵo, de bildo, de skizo, de signo; 4. nur deirante de tiuj du konkretaj starpunktoj, ni povas konduki la lernanton al la esprimmaniero, al konstruado de bona, tio estas logike konstruita parolado; 5. fine: la instruisto ne estas plu la absoluta posedanto de la kulturo, kaj kune, por helpi la lernantojn en la esplorado kaj konkero de la realo, tiel, li devas starigi laborgrupojn, kaj kunordigi ilin, por kompari ĉiam lian labormanieron kaj iliajn atingojn. Sume: ne plu ekzistas la instruisto lokita opozicie al la lernanto, sed ekzistas personoj kiuj kune laboras kaj pridiskutas por atingi iun celon, sin demandante pri la enhavo kaj pri la metodologio.

Nur sur tiu ĉi bazo ni povas komenci modeste kompreni kio signifas instrui kaj eduki (oni ne povas vere eduki sen instrui ion). Ni devas ĉiam fari memkritikon, por esti sufiĉe dignaj instruistoj, nepre kiam ni devas instrui Esperanton, kiu estas antaŭ ĉio idealo, novmaniero por eduki la homojn al universala penskapableco.

Ni devas rekte koni la spertojn de la instruistoj de la tuta mondo, pridiskuti kun ili, ĉiam rilatante niajn vidpunktojn al postuloj de moderna pedagogio, pri kiu ni skeme parolis supre.

Pri ĉiuj punktoj ni devas prinpensi ĉiam. Pli pripensi ol babili. Pli fari ol paroli, por eduki.

Ni revenos al tiu problemo en alia okazo.

internacia somera universitato 1977

Kadre de la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Rejkjaviko (Islando) inter la 30-a de julio kaj la 6-a de aŭgusto 1977, estas programita la Internacia Somera Universitato.

Universitataj profesoroj kaj kvalifikitaj personoj estas invitataj proponi sin por prelegi. Ili sendu resumon de la proponata prelego,, foton, biografion kun siaj titoloj kaj oficoj al la adreso de la komisiono pri I.S.U.: 2 bd. de douai, F-59100 Roubaix antaŭ la 15-a de januaro 1977.

projekto pri instruado

de la internacia lingvo en elementa kaj mezgrada lernejoj. De serĝo Mariani, didaktika direktoro ĉe la elementa lernejo «Oltresavjo» en Ĉezeno.

Oni povas difini «eduka» ĉiun programon, kiu, pere de lerno-procedo, celas la plenkreskadon kaj maturiĝon de persono en socia kaj individua sfero. Mi ne proponas al vi, per la jena referaĵo, demonstradon ke la instruado de Esperanto tre valoras por helpi personan maturiĝon: sufiĉas, ke mi citu ideon pri universala fraĵo, bezonon de interpopola komunikilo, kaj — kio estas pli proksima al nia temo — formiĝon de mensaj logikaj strukturoj, kiujn simpleco kaj reguleco de la esperanta lingvo-strukturo ebligas kaj stimulas. Pretigi proponon signifas estigi organizitan agadon, aranĝi taŭgajn ilojn kaj precizigi celojn.

Koncerne nian referaĵon, la celo estas la ekkonigo de Esperanto; la agadon oni devas organizi laŭ precizigitaj manieroj, t.e. devas ĝin akordigi kun metodologio taŭga. Metodologio des pli valoras, ju pli: 1) ĝi prizorgas pri la objekto de la agado (Esperanto); 2) ĝi konformiĝas al la subjekto (la lernanto de la deviga lernejo); 3) ĝi povos utiligi ilojn kaj rimedojn kiujn teĥniko metas je dispono;

Esperanto estas lingvo, homa interkomunikilo; do ĝin konsistigas du nevideblaj aspektoj: la signifoplena aspekto, kiun konsistigas la individua sperto de la parolanto, ĉu objektiva, ĉu subjektiva, kaj la signifodona aspekto, kiun konsistigas la tuta konvencia regularo, fonetisma, grafisma, struktura, pere de kiu individua objektiva kaj subjektiva sperto manifestiĝas kaj sekve komuniĝas. Lingva agado disvolviĝas en du direktojn:

- 1) aŭskulti kaj legi, kio estas interpreti la signifodonan aspekton de la lingvo por ricevi plenan komprenon;
- 2) paroli kaj skribi, kio estas kompreni la signifon pere de la signifodona lingva aspekto.

Pluan rimarkon meritas la elemento, kiun ni nomis «lingvostrukturo». Lingvo estas homkarakteriza produktado: homa menso funkcias per strukturoj, kiuj sekve estas la fundamento de la lingvo-komunikado; rezultas ke lingvo estas arĥitektura konstruo per bazaj elementoj, kiuj interrilatas funkcie. Strukturo estas organiza ideo, konstruiva kaj produktiva, kiu stimulas ĉiam novajn komprenojn. Kelkajn konsekvencojn de instrumentado bazita sur strukturismo indikas al ni Bruner:

- pli da intereso (ĉar la instruagado ja baziĝas sur la strukturaj tendencoj de la perceptado kaj pensado);
- pli facila enmemorigo (nocio enŝoviĝas en la strukturon kaj lokiĝas en reto de interrilatoj);
- ebleco transpasi de iu konon al alia analoga (*transfer*), sekve de la fakto ke am-

baŭ baziĝas sur la sama strukturo (oni difinas regularon kiel operaciigajn modelojn de nia konagado).

Por praktiki validan metodologion, krom la enhavo de la agado, necesas ankaŭ la kono de la subjekto de la agado mem, t.e. la knabo. Ĉi-rilate, oni devas konsideri la jenajn punktojn:

- ĉiama ĉeesto de motivoj, kiuj stimulas kaj subtenas intereson;
- neceso fari kaj agi (knabo havas konkretan logikon; abstraktecopolvon, t.e. nuran mensan aktivecon, la knabo akiras dum pli malfrua stadio de sia evolua kreskado);
- nepreco de sensaj stimuloj, precipe vidaj kaj aŭdaj.

La malmultaj konsideroj pri la lingvaj faktoj kaj la psikologio de la infano kondukas al la jenaj konkludoj pri kelkaj esencaj metodologiaj elementoj:

- alteniĝo al konkreta sperto de la parolanto (aŭ skribanto); utiligo samtempa de variaj esprimoj, t.e. desegno, mimiko, lingvo, muziko, k.t.p.;
- konstruo de la lingva mesaĝo.

La laŭcela agado (lernado de Esperanto), direktita laŭ precizigita metodologio, kiu postulas ke Esperanto estas lingvo kaj ke la infano havas proprajn lernmanierojn, dividiĝas en du partojn, kiuj strikte kaj daŭre interrilatas:

- konstruo de la lingvo-mesaĝo: **bazaj elementoj**: grafismo, fonetiko, terminaro; **projekto**: funkciiva strukturo;
- utiligo de la lingva mesaĝo: **buŝa**:konversacio, aŭskultado, teatro-ludado... ; **skriba** : legado, korespondado, rilatoj...

La agado, kiun ekestigas la tuta eduka programo, disvolviĝas laŭ apartaj miniprogramoj samtempe diferencaj kaj interrilataj (rimarku, ke ni preferas la terminon «miniprogramo» al «leciono»). Malgraŭ iliaj distingiĝaj trajtoj, kiuj havas proprajn bazajn ecojn:

1) Motivoj kaj interesoj:

- ju pli la knabo estas malgrandaĝa, des plila motivoj de la lernobjekto devas esti nerektaj;
- la lernadon de Esperanto, samkiel tiun de ĉiuj lernobjektoj, oni ne povas motivigi per idealaj kaj kulturaj kialoj, sed oni devas utiligi ludadon, teatro-ludadon, korespondadon, t.e. faradon, konceptita kiel okazo de valoriĝo kaj pliriĉiĝo de la personeco.

2) Pragmata aspekto:

- enŝovigo de la lernanto en konkretan sperton (media esploro, ludado, teatro-ludado, conversacio, korespondado, aŭskultado, pretigo de afiŝoj, desegnoj, k.t.p.);
- utiligo samtempa de esprimovaj rimedoj (t.e. la lingva mesaĝo, kunigita kun la mimika kaj grafika mesaĝo);
- utiligo de sensaj stimuloj, vidaj kaj aŭdaj;
- utiligo de didaktikaj helprimedoj, ankaŭ aŭdvidaj;
- plie da grupagado ol individua agado.

3) Logika aspekto:

- pripensado pri la lingvo kaj la konkreta mesaĝo;

- esplorado kaj observado pri la gramatikaj signoj kaj reguloj, kaj la funkcia strukturo de la mesaĝo.

Revenante al la antaŭdiritaj rimarkoj pri la du interrilataj partoj de la instrua kaj lerniga agado, la pragmata aspekto estas la utiligo buŝa kaj skriba de la lingvo-mesaĝo, la logika aspekto estas la konstruado de la sama mesaĝo pere de la kunmeto de la bazaj elementoj (skribmaniero, fonetiko, terminaro, gramatikaj reguloj) kaj ties uzado funkcia en la sciiga konstruo.

Moderna metodologia studado ne povas ne interesiĝi pri la utiligo de la didaktikaj helpimedo, de la plej simplaj kaj tradiciaj (libroj, slipoj, afiŝoj, nigraj tabuloj) ĝis la plej modernaj kaj rafinitaj aŭdvidiloj, magnetaj kaj lumaj tabuloj ĝis lingvaj laboratorioj kaj lernmaŝinoj). Kelkaj mallongaj rimarkoj:

- a) la didaktikaj helpiloj devas esti valorigitaj; la lernejan agadon oni ne povas plu fondi nure sur tradiciaj momentoj: buŝa leciono, ekzercado, pridemandoj; vera lernproceso (pli bone diri memlernado) fondiĝas sur konkreta sperto de la lernanto, sur situacioj kiel eble plej realaj kaj konkretaj, sur sensaj stimuloj, kiujn nur aŭdvidaj komunikiloj povas doni;
- b) la helpilojn oni devas aliflanke demitigi: la plej grandaj danĝeroj estas plagiato kaj pasiveco (ĉi-rilate sperto pri «*mass media*» estas signifa); alia danĝero konsistas el meĥanikeco kaj teĥnikeco troegaj je perdo de kreiveco;
- c) solvo de malfacila problemo de taŭga kompromiso inter valorigo kaj demitigo de la didaktikaj helpiloj, povus esti interesiĝi la lernantojn pri la konstruado kaj pretigo de la helpiloj mem; kaj, kiam tio ne estas ebla, kaŭze de teĥnologiaj procedoj, konigi al la lernantoj ilian funkciadon, eĉ tre supraĵe.

Rilate la enhavon specifan de lerneja agado celanta la lernigo de Esperanto, povus esti utile indiki skeme tri fazojn:

- a) inicado al skribado kaj elparolado:
 - farante komparon kun la itala alfabeto, precizigi la diversajn literojn, kaj la funkcion de la supersigno (supersignitaj literoj); fonetikan kaj grafikan aspekton oni rimarkas samtempe kun la vortoj klarigitaj de la desegnaĵo kaj precizigitaj de surbendigiloj;
 - evidenti la akcenton sur la antaŭlasta vokalo;
 - ekzerci la lernantojn al legado (ĉiam helpe de desegnaĵoj kaj surbendigiloj per kiuj oni povas registri kaj poste reaŭskulti);
- b) minimuma frazo:
 - ekrimarki en la lingva mesaĝo la signifajn erojn (diritaĵojn) kaj en ili la «minimuman paron» (havanta esencan signifon) kaj la pligrandigon (espansioj), kiuj precizigas kaj pliriĉigas la signifon;
 - analizi la minimuman paron: oni rimarkas la noman parton (artikolo, nomo, subjekto);
 - la verban parton: verbo (verba kaj noma predikato);
 - analizi la grafisman respondadon (gramatikaj finaĵoj) kun la gramatika funkcio de la vortoj (nomo, adjektivo, adverbo, singularo, pluralo, verbaj tempoj, k.t.p.).

La metodo devas ĉiam kuŝi sur la komparo de minimumaj frazoj, kunligitaj kun konkretaj spertoj;

- c) pliriĉigo de la minimuma frazo pere de aldono de ekspansioj laŭ gradigita programo kiu ebligas ĉiam pli riĉajn spertojn; progresado povas esti:
 - ekspansioj: dependaj (artikoloj, adjektivoj), sendependaj (adverboj) rektaj (rekta komplemento), nerektaj (nrekta komplemento kunigita per prepozicio);
 - kunordigitaj kaj subordigitaj prepozicioj.

La pliriĉigon de la minimuma frazo oni devas konstrui almenaŭ en la komenco, laŭgrade, per logikaj kunligoj de la lingva mesaĝo kun ties rilata grafika esprimmaniero. Komence de baza bildo, oni aldonu aliajn elementojn por plisignifi la desegnaĵon kaj samtempe pliriĉigi la lingvan mesaĝon pere de ekspansioj, kiuj enŝovas sin en la kunteksto de la parolado kun preciza signifa funkcio.

Dum la instruprocedo, oni alfrontu la problemon de la vortfarado pere de la afiksoj, utiligante ĉiam grafikan skizon. Je kompletigo kaj klarigo de la eduka programo, ni prezentas ĉialdonite kelkajn didaktikajn skemojn kaj citaĵojn de leĝaj aranĝoj, kiuj ebligas la enkondukon de Esperanto en la devigajn lernejojn.

Serĝo Mariani



konsilataj abonoj.

Kontakto – revuo de TEJO kvaronjara, belaspekta, unikspeca revuo en Esperanto. Jarabono: 15 gld. pagebla ĉe la landaj perantoj de Uea

IPR – organo de ILEI kvarmonata, sciencnivela. Abonebla ĉe la sekciestroj de ILEI (vidu la liston en la lasta kovrilpaĝo).

gvidado de la junularo

anglalingve verkita de *William A. Getby* por la *Universal World Harmony Movement* kaj de li esperantigita kun permeso de U.W.H.M.

Plimulto de la civilizitaj homoj senhezite asertus «edukado estas io bona» kaj «harmonio estas dezirinda» kaj ĉar ambaŭ asertoj estas akceptindaj ili devus esti firme kunligitaj kaj kun universala subteno esti alcelataj ĝis la lima ebleco.

Tamen edukado, laŭ teĥnika aprecio, povas konduki al la invento de mortigaj bataliloj kaj harmonio povas tiom preme kaj profunde esti postulata interne de specifaj homgrupoj (ekzemple iuj el la rigide religiaj sektoj) ke ili apartigas sin de aliaj sektoj kaj najbaroj. Do ni devas modifi ambaŭ asertojn kaj diri «edukado de akceptebla tipo.....» kaj «harmonio, kiu estas universala kaj ne limigita inter homgrupoj en tia maniero ke formiĝos malgrandaj harmonigrupoj de kontraŭuloj».

Ni konsideru unue edukadon - kaj tuj ni devas agnoski la fakton, ke edukado komenciĝas je naskiĝo kaj daŭras tra la tuta vivo. La signifo de tio estas, ke relative mallonga estas la periodo dum kiŭ la individuo ricevas sian edukadon en lernejo aŭ universitato. Tamen granda parto de tiu limigita periodo estas dediĉita al remburado de la cerbo per grandega amaso de faktoj akceptataj kiel necesaj al la moderna junulo.

Rilate al edukado provizita de la ŝtato, oni zorge aranĝas ke tiu estu taŭga... kaj la kosto estas grandioza.

Efektive en la pli multaj landoj edukado estas la plej grava ŝtatentrepreno, kaj Britujo provizas bonan ekzemplon. En Britujo la ŝtato elsprezas pli da mono por edukado ol por militaj defendceloj aŭ publikaj sanrimedoj. Oni kalkulas, ke unu kvinono de la homoj (en Britujo) okupiĝas pri edukado, aŭ en ĝia provizo aŭ ĝia ricevo.

Sed multe pli profunda speco de edukado estas ricevita de la infano antaŭ ol li aŭ ŝi «iras al la lernejo». La novnaskitan infanon la patrino devas nutri, flegi kaj prizorgi, kaj senĉese ŝi instigas la infanon al la esprimado de ties reakcioj.

Laŭvice aliaj membroj de la familio estas vokitaj por partopreni en la tasko kaj baldaŭ la infano sentas ke li aŭ ŝi vivas en etoso kiu alportas trankvilecon kaj plezuron, tamen daŭre vokas por la aventuro de la lernado de novaj faktoj kaj la rekono de novaj vizaĝoj kaj voĉoj. Jen la vera komenco de edukado, kio preparas la infanon por fronti al la infanlerneja societo de similaj infanoj, ĉiuj malkovrante novajn talentojn kaj kapablojn, kaj ĉiuj stimolataj de la kvalifikita kaj simpatia instruisto, sed kutime en unu ĝis du jaroj post la naskiĝo plimulto de la infanoj jam estus akironta kapablon paroli kaj kompreni la paroladon de kunuloj.

Kaj jen la krizpunkto kie ekaperas diferenco. La infano unue lispos kaj babilados en la lingvo de la gepatroj. Negrave kiom limigita la vortprovizo en la fruaj jaroj, la infano malrapide akiros pli kaj pli da vortoj, kaj ĉiu tia vorto estos artefarita inventaĵo, iam en la pasinteco kreita de unu el la praaĵoj de la infano kaj

akceptita de la socia grupo, tribo aŭ nacio al kiu li apartenas. Ĉi tiuj vortoj kaj kunligos la grupanoj aŭ naciojn kaj samtempe apartigos ilin de la «fremdaj najbaroj».

Nature en la nuntempo la bariloj de lingvouzo estas transireblaj de kleruloj ĝis certa limo, sed por la amaso de homoj, kaj precipe gejunuloj, la sento de aparteco estas profunda. La kontrasto estas pliprofundigita de instinkta komparo inter la sekureco kaj komforto de la hejmo, kun ĝia amplena etoso kaj la nekomprenebla strangeco de iu ajn «fremda» socio.

Kaj jen la etapo je kiu ni komencas konstati la preskaŭ nemezureblan malfacilaĵon kiun ni devas venki, aŭ almenaŭ modifi antaŭ ol eĉ pensi pri mondharmonio.

Ĉu restas espero? Kompreneble restas espero: Sed ankaŭ estas necesa nepra firmeco.... Kvankam la nacioj de la mondo sin organizis en la proprajn civilizaciojn (inkluzive de la propraj defendsystemoj), la esenca kooperado implicita en civilizacio povas esti - kaj ja estas - utiligita por pli ampleksaj celoj ol nura defendado. La komuna defendado ne nepre inkluzivas komunan saĝecon; sed la strebado al mondkunlaboro povas sukcesi rezulte de ampleksa edukado, edukado ne nur ampleksa sed ankaŭ longdaŭra. Iu ajn muzikisto klarigos al vi, ke se kordinstrumento estas iel neglektata la kordoj malstreĉiĝos. Necesas do ofta observado.

Simile, kiam temas pri la edukado de gejunuloj ili devas esti observataj, kuraĝigitaj, inspiritaj kaj instruitaj laŭ la kapabloj de tiuj gejunuloj. Ĉi tiu traktadmaniero estas la nuntempa idealo en evoluintaj landoj, kvankam ĉiu tia lando kompreneble konstruas la propran sistemon. La efektivigo de tia sistemo estas afero sub la direktado de la centra kaj loka registaroj, helpataj kaj konsilataj de oficialuloj, esplor-organizaĵoj, komitatoj kaj (fine sed ne la malplej gravaj) lernejestroj kaj instruistoj.

Eĉ kun helpo de tiom da gvidlinioj, aranĝitaj por konformi al lokaj cirkonstancoj, evidentiĝas ke ĝenerale simila serio da bazaj temoj devas esti pritraktita ĉie por ebligi la agnoskon de normoj en ĉiuj landoj, kondukanta al kvalifiko pere de ekzamenoj, precipe en la plej altaj etapoj de edukado (universitatoj, teĥnikaj kolegioj kaj artkolegioj). Sekvas nature, ke skemoj pri edukado estas planitaj kun celo akiri ĉi tian kvalifikon, kvankam oni rekonas, ke nur malgranda proporcio de studentoj fakte akiros ĉi tiun finan ateston de kvalifiko.

La akiro de ĉi tiu atesto pere de ekzameno estas ja praktika sed ankaŭ vere limiga. Feliĉe edukado estas io multe pli ampleksa ol nura preparado por ekzamenoj. Efektive la vera celo de edukado estas taŭgigi junulojn, adoleskojn kaj plenaĝulojn por fronti al la vivo en ĉiuj aspektoj—fizikaj, mensaj kaj animaj.

La signifo de tio estas, ke instruisto ne povas esti iaspeca policisto kies tasko estas konduki grupojn de gejunuloj de klaso al klaso post injekcio al ĉiu klasano de dozo de «edukado» taŭga por specifa aĝgrupo. Ne! Ju pli kvalifikita estas la instruisto des pli li (aŭ ŝi) kapablas kompreni kaj taŭge helpi ĉiun individuon en la klaso.

Ĉiuj junuloj malsamas, tamen en iu ajn lando ili ĝuas la saman fonon kaj tial

renkontas similajn spertojn kaj problemojn.

La pilgrimo en *Pilgrim's Progress* de J. Bunjan ĉiam portis sur la ŝultroj pezan ruksakon, kaj tio simbolis la kulturon de li akiritan dum la vivodaŭro. Do dum la kresko de la junulo li aŭ ŝi abstraktas de la ĉirkaŭa societo la bazan esencon de kaj loka kaj nacia kulturo; kaj ĉi tiu ĝemelkulturo profunde influas lian aŭ ŝian vivon.

Ankoraŭfoje la sagaca instruisto konas ĉi tiun influon kaj strebas, per lerta tuŝo kaj delikata sugesto ĉi tie kaj tie, konservi por la lernanto ekvilibran vojon.

Unu elstara problemo kiu frontas al ĉiu individuo estas la problemo kiel certigi la samrapidan paralelan kreskon de la du oponantaj homaj tendencoj, nome kooperado kaj konkurado. Ĉar konkurado plej kredeble kaŭzos malakordon inter infanoj, plenaĝuloj, grupoj, triboj kaj eĉ nacioj, kutime okazas intelektaj erupcioj en la fono por malpliigi la sumon kaj modifi la efikojn de la konkurado.

Tamen ni plej ofte tendencas kuraĝigi en la infano lokan lojalecon kaj nacian patriotismon, kaj rilate al la dua, niaj naciaj lingvoj ludas gravan rolon kaj tial estas ĵaluze prizorgataj.

Aliflanke nia familia vivo, nia laboro en la lernejoj kaj niaj kuniĝemaj instinktoj inklinas nin agnoski, ke kunlaborado estas kaj plezurdona kaj profitdona.

Laŭ onidiro la vivo progresas ondritme, kaj ni devas rekoni la ekvilibran sperton intern kunlaboro kaj konkurado en la ĉiutaga vivo. Ni devas ankaŭ diskuti la spertojn kun niaj amikoj kaj konatuloj.

Se ni akceptus tiun agadmanieron la rondoj de niaj amikoj kaj konatuloj kreskus kaj kreskos, kaj tute nature ni akceptus la idealojn de la Universala Mondharmonia Movado kaj ni partoprenus en ĝia tutmonda alvoko al pozitiva pensado.

konsilataj libroj

vidu ankaŭ paĝo 47.a

Gerard de Nerval — la ĥimeroj — tradukis Gaston Waringhien — kun kontraŭpaĝa franca originalo —

En ĉi tiu nova volumo de la prestiĝa eldonserio 'la plejado' la pura tradukteĥniko de Waringhien prezentas al ni «la unuajn aperojn de la subkonscio en la franca poezio». Ascoli Piceno, 1976. 80 paĝoj, 21 cm., kartone bindita. 3500 it. liroj

Louise Labé - La dudekkvar sonetoj — tradukis Wilhelm Theodore Oeste — kun kontraŭpaĝa franca originalo

Unua volumo de la eldonserio 'la plejado' kiu testimonias la senkompromisan evoluon de la verkosperto de Oeste. Ascoli Piceno, 1975. 80 paĝoj, 21 cm., kartone bindita. 3500 it. liroj

Kalman Kalocsay — El 'streĉita kordo — elekto de Vilmos Benczik —

Elĉerpa represo de poemoj el la ĉefverka kolekto de la Poeto. Budapesto, 1976. 24 paĝoj, 18 cm., broŝurita. 1000 it. liroj

La vivaj lingvoj

«Les langues vivantes» de Denis Girard. Eldonisto: Larousse, en Kolekto «Enseignement et Pédagogie» (instruado kaj pedagogio).

Jen libro kiu arigas multajn faktojn pri lingvo-instruado. Ĝi unue detalas la donitaĵojn de la problemo: kio estas paroli, akiri, lerni, instrui fremdan lingvon? En dua parto, la aŭtoro studas la kontribuaĵojn de la lingvistiko, de la psikologio, de la moderna teĥniko; el tio rezultas la *modernaj* metodoj pri lingvo-instruado. La tria parto traktas perspektivojn: metodikan renovigon, fruaĝan instruadon de vivantaj lingvoj, progresojn en la taksado, klerigadon de la instruistoj.

Fakte ĝi estas tre utila libro, ĉefe por la ordinaraj instruistoj, ne lingvo-instruistoj, kiuj provas instrui Esperanton. Ni dankas la eldonistojn kiuj permesis al ni traduki kaj aperigi kelkajn paĝojn kiuj temas pri la frua instruado de fremdaj lingvoj kaj raportas pri tri internaciaj kolokvoj. Du el ili okazis en Hamburgo, la dua sub la duobla patronado de Unesko kaj Eŭropa Konsilantaro; unu el ĝiaj konkludoj estis jena: *lam, la akirado de fremda lingvo devus esti parto de la baza instruado de la infano, same kiel la legad- kaj la skribado- kapabloj*. La tria okazis en Uppsala en februaro 1972 kaj jen kion skribas Denis Girard pri ĝi.

La raporto de la Uppsala-kolokvo entenas ĉefe la kompletan tekston de prepara raporto de H.H. Stern kiu estis *entuziasme akceptita kaj larĝe aprobita dum la tritagaj debatoj*, kaj kiu havigas al ni informojn multvalorajn pri la nuna situacio kaj povas nin helpi por imagi la estontecon.

Post taksado de tiu instruado en Usono, Kanado, Britujo kaj en ok aliaj landoj, la aŭtoro konkludas, ke *la instruado de lingvoj en elementaj lernejoj estas de nun akceptita kaj establita, sed ĝi ankoraŭ ne fariĝis tutmonda; ĝi ne estas ĉie agnoskita kiel estanta parto de ĉiu programo pri klerigado, kiel tio estis sugestita en la raporto de la unua hamburga kolokvo*. Se oni konsideras la spertojn amasigitajn, nun estas eble respondi senpasio al tri fundamentaj demandoj kiujn oni faris al si antaŭ dek jaroj:

- 1) Ĉu la frua inicado al fremdaj lingvoj riskas kaŭzi negativan efikon sur la tuto de la disvolviĝado?
- 2) Ĉu tio inicado kondukas al konvenaj progresoj en la uzokapablo de la fremda lingvo?
- 3) Ĉu ĝi rezultigas regadon nete superan al tiu kiun oni atingas komencinte pli malfrue?

La respondo al la unua demando estas klare nea, se oni konsideras la britan taksadon kies unuaj rezultoj tiurilate estas konfirmitaj de aliaj studoj. Pri la sama temo, oni povas mencii la konkudojn de *Lewis Balkan* fine de siaj studoj pri la

efektoj de la dulingvismo franca-angla sur la intelektaj kapabloj. Sukcesinte evidenti superajn intelektajn kapablojn favore al infanoj dulingvaj kompare al infanoj unulingvaj posedantaj la saman nivelon de ĝenerala inteligenteco, la aŭtoro deduktas, ke saĝnas saĝe konsideri ebla la enkondukon de dua lingvo jam de la buclernejoj kaj ĝian lernadon dum la tuta unuagrada instruado.

Al la dua demando, H.H. Stern respondas, ke estas evidente, laŭ la spertoj de la profesoroj en multaj lokoj de la mondo, ke lingvoj povas esti efike lernataj kaj instruataj en la kadro de la elementa lernejo.

La respondo al la tria demando devas esti pli nuanca, ĉar oni ankoraŭ ne disponas pri sufiĉe da komparigaj elementoj. Ŝajnas ke la diferencoj ne estas okulfrapaj sed, ke la rezultoj observitaj estas favoraj al la infanoj kiuj profitas de frua inicado, ĉefe sur la kampo de la parola lingvo-kapablo. La metodika renovigo aplikota al tiu nivelo, per pli granda loko dediĉota al la kreivo, kaj nun pli altgrada individuigo, devus konfirmi tiun tendencan.

La plej interesa parto de la raporto de H.H. Stern estas sendube tiu en kiu li montras kiel, laŭ la plej freŝdataj esploroj pri psikolingvistiko kaj sociolingvistiko, ŝajnas prave arigi en ĝenerala teorio, rilate al la tipe homa kapablo alproprigi diversajn kodojn, la fenomenojn pri akirado de lingvo, de natura dulingvismo, de lernado de diversaj nuancoj kaj sociaj kodoj interne de sama lingvo kaj de lernado de fremdaj lingvoj aŭ de duaj lingvoj.

Se oni seniluziiĝas pri la rezultatoj ĝis nun atingitaj en la frua instruado de vivantaj lingvoj, tio venas verŝajne de la fakto ke oni sin montris tro postulemaj, same kiel oni sin iluziis pri la pli granda efikeco de kelkaj modernaj metodoj. La plimalaltiĝo de la aĝo de la eklernado kaj la altiĝo de la tuta daŭro de tiu lernado estis, kaj certe ankoraŭ restas, pozitivaj faktoroj. Sed oni eble forgesis, ke ekzistas multaj aliaj faktoroj prikalkulendaj sed ofte neglektitaj, ekzemple la klerigado de la instruistoj, vera kunordigo inter la diversaj niveloj kaj bona adapto de la metodologio.

Malgraŭ la kompreneblaj retenoj de la administracioj kiuj hezitas investi gravajn sumojn por agadoj kies efikeco restas momente limigita, ne eblas al ni imagi, ke tiu subita flamfajro de la frua instruado de vivantaj lingvoj povus estingiĝi. La eduka valoro de tiu instruado estas tro granda en la nuna mondo por ke oni rifuzu al ĝi lokon, ĉe modestan, je la unuaj etapoj de la lernotempo. Ni deziru, ke esploroj pli fundaj, en forta ligo kun psikolingvistikaj kaj sociolingvistikaj studoj pri dulingvismo, precize difinu la instrutipon planindan.

Tiuj opinioj de specialistoj pravigas la klopodojn de ILEI enkonduki Esperanton en elementajn lernejojn. Do, ni kuraĝu sur nia vojo, ni zorge plenumu niajn eksperimentajn-taskojn kaj ni povos prezenti firmajn konkludojn favorajn al niaj celoj.

Frédéric Le Magadure

la erarojde la aliaj

«... ĉiu montru al mi la erarojn, kiujn li trovis en ĝi...» Zamenhof (O.V., paĝo 24 a)

Konsili lernantojn, kritiki iliajn erarojn, estas facile. Multe pli tikla afero estas atentigi malnovajn esperantistojn pri iliaj *probablaj* aŭ *certaj* eraroj. Tamen ĉiu scias, ke eĉ la plej lertaj povas erari. Ekz.: eĉ en la Plena Ilustrita Vortaro malgraŭ plurfoja relegado far kompetentuloj, restas eraroj.

Se neniu kuraĝas atentigi vin, min, nin, pri gramatikaj eraroj aŭ ĉefe pri «ismoj» (hungarismoj, francismoj, ktp.) kiel eviti ilin estontece? Kaj kiel progresi? Kaj kiel eviti dialektiĝon de la lingvo?

Estas ja konate, ke: «**Kritiki estas facile, fari malfacile**», «**Nur tiu ne eraras, kiu nenion faras**», «**En fremda okulo ni vidas ligneron, en nia trabon ne vidas**».

Pro tio, jen mia vidpunkto:

- 1) koncerne min, mi ege dankas al tiu, kiu atentigas min pri miaj eraroj.
- 2) koncerne la aliajn, mi opinias, ke mia devo estas atentigi ilin pri kio ŝokas min (kio tute ne signifas, ke mi estas absolute certa, ĉu mi pravas aŭ ne.)

Kara leganto, se vi samopinias kiel mi, kaj nur se vi estas certa, ke vi ne ofendiĝos, diru ĉu vi konsentas pri miaj rimarkoj.

Mia celo estas fari *konstruivan* kritikon, rilate la lingvon en IPR. Oni povus riproĉi al mi, ke antaŭ ol «kritiki» mi devus kunlabori sendante artikolojn. Prave! Sed tamen miaj rimarkoj pruvos, ke mi estas fidela leganto.

Estas ja bona rezulto, ke vivas IPR, ke en ĝi aperas interesaj artikoloj, ktp. Sed laŭ mia supozo, neniu el vi negos, ke tiu revuo devus esti unu el la plej valoraj rilate la kvaliton de la lingvo, ĝuste ĉar ĝi estas la revuo de la instruistoj, de la instruistoj, kiuj havas gravan rolon por ludi en la esperanta movado, kaj en la instruado de la lingvo.

Mia propono estas jena: oni notu sur la unua paĝo de la kovrilo tiun konsilon: «**Por ke la stilo de nia revuo estu kiel eble plej internacia, zamenhova, estas konsilinde al la kunlaborantoj submeti sian artikolon al unu au du alilingvanoj antaŭ ol sendi ĝin al I.P.R.**». Kaj, post la subskribo, oni aldonus, ekzemple: «**Lentaigite (reviziis Dazzini kaj Makking)**».

Mi scias, ke la afero estas pli facile dirita ol ĝi estas realigebla. Tamen, oni ne povas lasi la gramatikajn erarojn, la «ismojn» (francismoj, italismoj, hungarismoj) invadi nian revuon, do nian lingvon.

Persono, kiu verkas artikolon, havas interesajn ideojn por diri. Sed tio ne signifas, ke li (aŭ ŝi) perfekte regas la lingvon. Aliaj personoj, perfekte regas la lingvon laŭ si, sed ne konscias, ne povas konscii, ke en ilia stilo enŝteliĝas «ismoj»: nur alilandanoj povas tion rimarki.

el nordameriko

Jarraporto 1974 de la prezidanto de «America Asocio de Instruistoj de Esperanto».

1. Ĝenerala enkonduko:

Por la Esperanto-Movado en Usono kaj Kanado ĉi-tiu jaro estis jaro de progreso. Intereso en la Lingvo Internacia kreskis inter rondoj de lingvistoj, akademianoj kaj instruistoj. Seriozan akcepton de Esperanto en la kategorio de vivanta lingvo moderna indikis instancoj registaraj kaj profesiaj. Altvalorajn artikolojn pri Esperanto el vidpunkto eduka kaj lingvistika verkis membroj de A.A.I.E. kaj publikigis fakrevuoj profesiaj. Faktojn pri Esperanto kaj ekzemplerojn de la lingvo diskonigis televidaj kaj radiaj stacioj kiuj atingis publikon tro grandan. La laboro de A.A.I.E. kaj de ĝia membraro ludis rolon gravan en ĉi-tiuj sukcesoj.

2. Kursoj:

Sesdek du Esperanto-kursojn gvidis membroj de A.A.I.E. al 833 lernantoj en Usono kaj Kanado. Demonstradaj kursoj en lernejoj, kolegioj kaj universitatoj pruvis la facilan lerneblecon de Esperanto kaj ĝian valoron propedeŭtikan.

3. Ekzamena servo:

Daŭre funkcias la oficejo de la Ekzamena Servo en Santa Barbara, Kalifornio, kaj diplomojn ricevis sukcesaj kandidatoj ĉe la nivelo de Komencgrada kaj Mezgrada Ekzamenoj.

4. Profesia agnosko:

MLA (Asocio de Profesoroj de Lingvoj Modernaj) refoje dediĉis kunsidon specialan al konsidero de Esperanto ĉe la Jarkunveno en Ĉikago en Decembro 1973, kaj dum sia Jarkunveno de 1974 havos kunsidon similan kies programon estros Profesorino M. Hagler. Oficiale subtenos kurson por ĝeinstruistoj de Esperanto la Departamento de Publika Instruado de Columbus, Ohio, en aŭtuno de 1974.

5. Propagando:

Krom la instruado de Esperanto-kursoj, la Esperanto Grupo de Centra Ohio proparis «Projekton Columbus» de la 22-a de Aprilo ĝis la 6-a de Majo en urbo Columbus (enloĝantaro 500,000, ŝtata ĉefurbo kaj centro de Ohio State University) kaj en la apuda regiono programon de prelegoj per televido (6 programoj), radio (8 programoj), publikaj bibliotekoj kaj organizaĵoj profesiaj (4 programoj) klasoj

Antaŭ ol skribi tiun leteron, mi volis fari «internacian» enketon por scii ĉu aliaj pensas kiel mi, pri la diversaj «eraroj», kiujn mi renkontis. Fine, mi rezignis. Mi do donas kelkajn ekzemplojn, kiuj laŭ mi estas eraraj sed povas esti, ke mi mem eraras!

Mi elektos la ekzemplojn en 1975-kolekto n-roj 1 kaj 2.

1-a tipo de eraroj: n-ro 1, paĝo 16, linio -12: disko ne *eblas* kontrolon de prononco (devus esti: *ne ebligas*)

n-ro 2, paĝo 36, linio -3: ni *baltiĝis* (*ni baltis*)

n-ro 2, paĝo 40, linio 19: ĉiuj literaturoj *komencis* per poeziaĵo (*komenciĝis*)

2-a tipo: n-ro 1, paĝo 14, linio 14: la lingvo *spegulante la karakteron*, ĉu oni lasu la infanon skribi... (*ĉar la lingvo spegulas la karakteron, ĉu...*)

n-ro 1, paĝo 15, 2: sama rimarko.

n-ro 2, paĝo 40, 7: la ĉefa argumento estas, ke, *ne ekzistante Esperanto-popolo*, povas ekzisti....

n-ro 2, paĝo 40, linio -10: same.

Ablativo absoluta ne ekzistas en Esperanto (Vidu: «lingvaj respondoj» n-ro 118 de la 6a eldono), do ne povas esti komprenata de japanoj, hungaroj, ktp. Krome, ĝia ripetata uzo povas kredi al ili (japanoj, hungaroj...) ke ili ne sciopovas Esperanton!

3-a tipo: Vortoj mise uzataj:

n-ro 1, paĝo 18, linio -14: la enkondukaj vicoj de la leĝo *konceptas* (ne kongruas kun la difino donita en la Plena Ilustrita Vortaro «PIV»).

n-ro 1, paĝo 20, linio 3: S-ino Markarian *demontraciis la sorobanon* (laŭ mi, devus esti: *demonstraciis la funkciadon de la sorobano*).

n-ro 2, paĝo 26, linio 10: la instruistoj *nomis* deforajn kaŭzojn de ne ĉeesto. (Mi vidas nenion en PIV, kio povus simili al tiu frazo).

n-ro 2, paĝo 37, linio 22: ... dialogo, kiun mi *pretendis* tuj en Esperanto (?).

4-a tipo: «ismoj» n-ro 2, paĝo 36, linio -5: La mia estas malrapida laboro.

n-ro 2, paĝo 42, linio -5: la mia ne estis prelego.

Tiuj du ekzemploj estas por mi tre, tre strangaj

5-a tipo: Frazoj tiel enigmaj por mi, ke mi min demandas, kiu freneziĝas, ĉu mi, ĉu la aŭtoro. Pro tio mi devus peti la opinion de aliaj personoj. Tiaj frazoj estas multaj, sed mi citas neniun.

6-a tipo: diversaj gramatikaj eraroj: koncerne *vin*; pri *sia* ktp....

Mi citas ĉi-supre *tipojn* de eraroj; sed ne ĉiujn erarojn trovitajn en tiuj du numeroj. Kompreneble, mi ne aludas pri la preseraroj.

Lentaigne

en lernejoj, gimnazioj kaj universitatoj (10 lernejoj k.t.p. kaj 18 klasoj kaj demonstradoj); artikoloj en ĉefaj tagĵurnaloj. La programoj atingis inter 10.000 kaj 50.000 personojn. Preparis la programon s-ano Jane Wills kaj aliaj lokaj gesamideanoj kaj prelegis d-ro John L. Lewine, Prezidanto de A.A.I.E.

6. Problemoj:

Kiel ĉiuj organizaĵoj privataj, A.A.I.E. suferas pro inflacio tutmonda. Plialtigo de kotizoj kaj nova sistemo de kotizpagado estas konsiderendaj.

7. Nekrologo:

Doloriga sciigo lastmomenta estas la morto de nia membrino nelacigebla kaj sindediĉa, s-ino Jane Wills, de Columbus, Ohio, kies klopodojn poresperantajn kiel instruistino kaj kursgvidantino per radio kronis «Projekto Columbus» (vidu supre), kiu certe estas la plej sukcesa poresperanta programo en Nord-Ameriko.

8. Dankoj:

Kvankam tute neeble estas por mi esprimi miajn dankojn al ĉiuj niaj membroj kiuj sukcese progresigis la Esperanto-Movadon dum la pasintaj dek-du monatoj, mi volas esprimi al la postenuloj de A.A.I.E. mian dankemon por ilia kunlaboro fidela kaj senlaca. Al niaj kolegoj profesiaj kiuj sukcese gajnis la agnoskon de Esperanto en la mondo akademia kaj partoprenis la diskutojn pri la Lingvo Internacia ĉe kunsidoj profesiaj, kaj al miaj gekolegoj kiuj en siaj klasĉambroj pruvigis al siaj gelernantoj kaj al siaj gekolegoj la valoron nediskuteblan de nia lingvo, kaj al niaj gekolegoj internaciaj de ILEI, inkluzive ĝian Sekretarion-Ĝeneralan, d-ro Prof. Dazzini pro lia intereso simpatia en la problemoj kaj sukcesoj de A.A.I.E., kaj al la redaktorino de nia Bulteno - revuo de alta valoro, disdoninda kaj disdonenda al samprofesiaj kolegoj kiuj ĝis nun ne komprenas la valoron kulturalan kaj edukatan de Esperanto - al ili kaj al ĉiuj kunlaborantoj - profesiaj aŭ neprofesiaj, kies laborado pedagoga progresigas nian idealon komunan, mi volas esprimi mian dankemon sinceran kaj miajn bondezirojn por sukceso kreskanta en la vortoj de niaj samideanoj nederlandaj: «La Estonto estos Nia»!

John L. Lewine
Prezidanto de A.A.I.E.

Jar-raporto de la eduka sekretario je la 28-an de majo 1974

La statistikoj ne estas kompletaj ĉar ni aŭdadas pri kursoj pri kio ni ne ricevis raportojn. Tamen, mi nun ricevis raportojn pri 62 kursojn, jene:

studantoj	infanoj	junuloj	plenkreskuloj
90 ĉe 17 hejmaj kursoj	20	3	67
120 ĉe 14 ejoj por plenkreskuloj	4	13	103
56 ĉe 6 universitatoj	0	13	43
184 ĉe 10 altlernejoj	19	164	1
383 ĉe 15 elementaj lernejoj	383	0	0
833 ĉe 62 kursoj	426	193	214

Preskaŭ ĉiuj estas elementaj kursoj de iu sama tipo.

Preskaŭ ĉiuj estas en marbordaj ŝtatoj. La centra parto de nia lando estas sen Esperanto-kursoj.

Instruistoj de Esperanto devas raporti la kursojn, alio la informo ne estas havebla al la eduka sekretario de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto.

William P. Sampson
Eduka Sekretario de AAIE

konsilataj libroj

Giuseppe Ungaretti — La doloro — poemoj 1937-1946 — tradukis Nicolino Rossi
La plej sentoplenaj versoj de la homo, kiu revoluciis la poezion en Italujo, laŭ majstra traduko de unu el la plej talentaj poetoj de la nova internacilingva generacio. Pisa, 1975. 64 paĝoj, 21 cm., kartone bindita. 1800 it.liroj

IEJ-kantareto — 37 junularaj kantoj, jam tradiciaj dum la Esperanto-kongresoj kaj kunvenoj. Milano, 1973. 60 paĝoj, 20 cm., broŝurita. 1500 it.liroj.

Por mendi la ĉi-suprajn librojn vin turnu al la

Libroservo de ILEI «A. Vallerini»
via consoli del mare, 15
i-56100 Pizo, Italujo

pĉk. 22/10219

vidu ankaŭ paĝo 40.a

en plua universitato

Starigita Esperanto-sekcio en la Universitato de Provenco (Aix-Marseille I).

De la jaro 1970 funkcias oficiala kurso de Esperanto en la kadro de la Instituto pri Ĝenerala Lingvistiko kaj pri Orientaj kaj Slavaj Studoj (ILGEOS). La kurso, destinita al komencantoj, daŭras unu jaron. Ĝi okazas po unu horo kaj duono ĉiusemajne. La studentoj povas ricevi, post sukceso al ekzameno, universitatan diplomon (*Attestation d'Etudes préparatoires d'espéranto*) aŭ/kaj elekti Esperanton en la kadro de la ŝtata diplomo DEUG (de kiu ĝi konsistigas 5 procente).

La instruadon gvidas Michel Duc Goninaz, ĉefasistanto pri la rusa lingvo. La nombro da studentoj, malgranda en la unuaj jaroj, kreskis iom post iom. Ĉijare ĉirkaŭ 30 gestudentoj partoprenas la kurson.

Dank' al ĉiujara subvencio de la Instituto kaj al grava libro-donaco de la loka Esperanto-grupo, la Esperanto-Sekcio posedas bibliotekon kun preskaŭ 500 volumoj. Ĝi abonas 8 esperantlingvajn revuojn.

La Esperanto-sekcio volonte ricevas donacojn por la biblioteko kaj ankaŭ ĉiaspecajn esperantlingvajn dokumentojn, kiuj povas interesi la studentojn (programoj de estontaj kongresoj kaj renkontiĝoj, librokatalogoj k.s.).

Ni ankaŭ volonte ekrilatos kun Universitatoj kaj Superaj Lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata.

Nia adreso estas: Université de Provence, Section d'Espéranto (ILGEOS) 29, avenue Robert-Schuman F-13126 Aix-en-Provence (Francujo).

Noto: En la n-ro 3-4 de la revuo «*Cahier de Linguistique, d'Orientalisme et de Slavistique*», eldonata ĉe la Provenca Universitato, aperis artikolo de Michel Duc Goninaz pri la slavaj influoj en Esperanto (franclingva titolo: *Les influences slaves en espéranto*)

la ĉevalo kiu ne soifas

Franca pedagogo FREINET ofte demonstris siajn ideojn, apogante ilin per trafaj ekzemploj, ĉerpitaj en la kampara vivo.

Juna urbano deziris esti utila en la bieno, kie li gaste ricevis loĝon kaj nutron. «Antaŭ ol konduki la ĉevalon al la kampo, -li enpense diris-, mi trinkigos ĝin. Tiel, mi ŝparos tempon, kaj mi estos trankvila la tutan tagon!». ... Rifuzo! ... Ĉu ordonas ĝi, la ĉevalo? Kial al la trinkejo ĝi ne volas iri, sed nur al la luzern-kampo insiste okulumas?

«Ek al la trinkejo! Ordonas mi!»

Kaj la novica kamparano la bridon tiras, posten iras, kaj la beston senkompatate frapas...

«Jen mi sukcesis!» Ĉe la rando de la trinkujo estas la ĉevalo.

«Ne trinkas vi? Kial? Mi karesu vin... Jen vidu. Pura estas la akvo! Metu la nazon en ĝin».

.....«Ne? ... Obstinulo!» Kaj perforte la urbano enpuŝas la nazon de la ĉevalo en la akvon.

«Vole, ne vole, trinku...» Ĝi snufas, blovas sed ne trinkas...

Alvenas la bienulo, kiu ironie diras:

«Ĉu vi opinias, ke oni tiel agas kun ĉevalo? Malpli stulta ol homo ĝi estas. Ĉu vi ne scias tion: ĝi ne soifas; eĉ se vi minacos ĝin per morto, ĝi ne trinkos. Eble ĝi ŝajnigos. Sed la englutitan akvon, ĝi poste sputos. Do vana estas via peno, kara».

«Kion fari do?»

«Oni ja vidas, ke vi ne naskiĝis kamparano. Vi ne komprenas, ke la ĉevalo ne soifas en ĉiu frua mateno sed ke ĝi, -nepre unue-, bezonas freŝan herbon. Lasu ĝin satiĝi; poste, ĝi soifos. Kaj vi vidos ĝin memvole kuri al la trinkejo ne atendite vian instigon aŭ permeson. Mi eĉ konsilas, ke vi ne baru al ĝi la vojon! Kaj kiam ĝi trinkos, ne provu tiri la bridon. Estus vane».

Oni ĉiam eraras, kiam oni volas inversigi la naturan ordon de la aferoj..... kaj «trinkigi ĉevalon, kiu ne soifas».

Edukistoj! Vi staras ĉe kruciĝejoj! Ne obstine kaj erare sekvu la pedagogion de «la ĉevalo, kiu ne soifas». Iru prudente kaj kuraĝe al pedagogio de «la ĉevalo kiu galopas al luzerno, kaj poste al la trinkejo».

Freinet.

Tradukis: Lentaigne (Francujo) Reviziis la tradukon: Kakuo (Japanujo), Skovrind (Danujo).

Estraro de ILEI

- Prezidanto: Rektoro Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen (Fed. Resp. Germanujo)
- Vicprezidanto: Direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapest X, (Hungarujo)
- Sekretario: D-ro Mario Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa C., (Italujo)
- Vicsekretario: S-ro Gaston Turin, 43 Rue Emile Magnin, F-25300 Pontarlier (Francujo)
- Kasisto: S-ro Olle Osson, Bantorget 3, S-222 29 Lund (Svedujo).
p.ĝ.k. Stockholm 682 117-7.

Sekciestroj de la Ligo

- Aŭstralio: Ivan Th. Maddern, Box 411, Morwell, Victoria 3840
- Aŭstrujo: Ernst Rixner, Kleingasse 6 - 18/8/13, A - 1030, Vieno
- Belgujo: G. Pirlot, Residentie «Vaughan», Kemmelbergstraat 3-5/b.3 B-8400 Oostende
- Brazilo: Elvira Fontes, Caixa Postal 5888, São Paulo
- Britujo: Raif Markarian, 87 Sebastian Ave., Shenfield, Brentwood, Essex CM15 8PP
- Bulgarujo: Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia
- Danlando: Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre
- Finnlando: Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
- Francujo: F. Le Magadure, 23 Rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
- F.R.Germanujo: Hermann Behrmann, Ellerbuscher Str. 81, D-4972 Löhne 1
- Grekujo: Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia, Ateno (816)
- Hispanujo: Franciskb Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante
- Hungarujo: Marta Cser, Zelau út. 10-14, H-1368 Budapest V
- Islando: Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík
- Israelo: Ron Aser, Raanana, Aŝer 5
- Italujo: Catina Giulia Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C.
- Japanujo: Gamon Higashi-cho 6-51, Koshigaya-shi 343
- Jugoslavio: Miodgrad Stojanovič, Duruntorska ul. 2/IV-32, YU-11000 Beograd
- Kanado: George du Temple, 930 Ardmore Drive, R.R.2, Sidney, B.C. V8L 3S1
- Kolombio: Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellín
- Koreujo: Dae Young-Rhie, 240-19, Sang-do-2-dong, Yong-dung-po Ku, Seoul
- Nederlando: O. Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1719 Schoorl
- Norvegujo: Elna Matland, Brekkeveien 50, N-4200 Sauda
- Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 1 Wood Street, Upper Hutt
- Pollando: Teresa Nemere, str. J: Olbrachta 3/5 m 12, PL-87-100 Toruń
- Rumanujo: Prof. D-ro Gabriel Tepelea, Calea Grivitei N-ro 222, Bloc 7, Scara B București 8
- Sanmarino: Prof. Marina Michelotti, via XXV marzo 73, I-43031 Rep. S. Marino
- Sovet-Unio: Joŝannes Palu, Sólme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV
Nikolaj Starodubčev, poŝtrestante, SU-340047 Doneck
- Svedujo: Olle Olsson, Bantorget 3, S-222-29 Lund
- Svislando: Kurt Greutert, Via Pizzo di Claro 7, CH-6512 Giubiasco
- Usono: John L. Lewine, West Stockbridge, MA 01266

Kunlaborantaj organizaĵoj aŭ izolitaj membroj

- Ĉeĥoslovakujo: Karel Kraft, poŝta 5, Zdobov V-28, CS-261 05 Pŝibram
- Germana DR: Ludwig Schödl, Rosa Luxemburgstr. 37, DDR-195 Neuruppin
- Kubo: Pedro Pablo Lamas Díaz, Apartado 223, Ciego de Avila
- Zairujo: Antome-Samuel Ngangu, B.P. 13, Lukala (Nkandu)